

Internacia Fervojisto



Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFE)
revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270

2021.1


La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn



Trans Alpine Express

Novjara mesaĝo de la prezidantino de IFEF

Karaj amikoj,



La pasinta jaro estis defia por ni ĉiuj.

Unuflanke ni konstatis ĉe pluraj institucioj, anstataŭ tujan kaj trafan intervenon por trovi radikalajn solvojn al kernaj problemoj rilate pandemion inter kiuj la plej grava estas la sana sekureco, iom da ĥaosa reago kiu kaŭzis multege da mortintoj.

Aliflanke ni vidis la homecan spiriton, ni vidis kiom multaj el la profesiuloj restis unuiĝintaj kaj trovis rimarkindajn rimedojn por alfronti la malfacilan periodon, kiun ni travivas. Ni vidis la bonon en homoj, en niaj najbaroj kaj en niaj komunumoj, kiuj kunigis fortojn kaj helpis tiujn en bezono. Ekzemploj estas multaj kaj pri kelkaj oni rakontis en nia revuo.

Estas pli kaj pli klare, ke la vojoj por profiti kion ni lernis el la pandemio kaj anticipi pli inteligente la estontajn minacojn ne estas multaj. Temas ĉefe pri kunlaborado kaj interpersona harmonio, kiujn anticipis L.L. Zamenhof en la jaro 1905: „...sed homoj kun homoj.”

Por ni esperantistoj estas facile kaj memevidente sekvi tiun vojon, ĉar ĝi spegulas la internan ideon kiu kunigas dekomence nian tutmondan komunumon kaj kiu gvidas nian konduton.

Se temas pri la fervojistoj esperantistaj, des pli aktuala kaj gvida estas nia devizo: „La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn!”. Neniam ni forgesu la profundan filozofion kiu sin kaŝas en tiuj vortoj. Fronte al skua realaĵo ni daŭre konservu niajn ligojn. Malfacilas prognozi nun ĉu en 2021 ni renkontiĝos fizike aŭ nur virtuale, sed la IFEF-estraro faras ĉion eblan por ke niaj kontaktoj estu kiel eble plej oftaj kaj profitigaj, por certigi la estontecon de niaj fakaj kulturo kaj movado.

Nome de la estraro mi deziras al vi sanon, optimismon kaj esperon ke la nova jaro alportos al ni pli bonajn spertojn!

Rodica Todor

Enhavo:

Novjara mesaĝo de la prezidantino de IFEF.....	2
Forpasis CECI Pasqual	4
72-a IFK - alia kongreso.....	4
Anonco pri elektoj dum la jaro 2021 en IFEF	5
Gvidanto de la Faka Komisiono	6
Alvoko al ĉiutaga komunikado.....	6
Nova fervoja prov-instalaĵo malfermiĝos en Anglio	7
Trajnoj kaj busoj senpagaj	12
Eŭropa parlamento aprobis Eŭropan Jaron de Fervojo 2021	13
Usona Fervojasocio	14
Ankaŭ ĉe FFEA okazis unua fojo	16
Interreta psikologia konsilado dum la pandemio de Covid-19	17
IFEF membro helpas dum koronvira pandemio	18
Honorigitaj membroj	20
Titolpaĝo: <i>Trans Alpine Express</i> en stacio Argentière (2004)	

Internacia Fervojisto

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

Estraro de IFEF

Prezidantino: Rodica Todor (Rumanio) rodica_todor@yahoo.com

Sekretario: Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it

Kasisto: Laurent Vignaud (Francio) laurent@ifef.net

Redaktoro: Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) kovar.lad@email.cz

Gvidanto de la Faka Komisiono: Jan Niemann (Danio) niemann@kabelmail.dk

Membroj de la Redaktora Komisiono

Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

Membroj de la Faka Komisiono

Guido Brandenburg (Germanio), guido.brandenburg@t-online.de

Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), Jaroslav.Matuska@upce.cz

Bank-Konto:

Nomo: „Laurent Vignaud”

IBAN: FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

BIC: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Retejo: www.ifef.net

Facebook: <https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

Forpasis CECI Pasquale (Colorno (PR) 14.07.1927 - Bologna 24.12.2020)

Sinjoro Ceci laboris kiel ĉefteknikisto en veturilriparejo kaj prezidanto de DLF (*Dopolavoro Ferroviario*) en *Bologna* dum la jaroj 1959 ĝis 1975. Li multe apogis esperantistojn kaj partoprenis kun la edzino Clementina (Nara) multajn IFEF-kongresojn. Li grave rolis en organizado de IFK en *Rimini* 1970 kaj Romo 1978. Li estis membro de LKK dum IFK en *Cervia* 1993. En la jaro 1970 li iĝis membro de Honora Patrona Komitato de IFEF. Dum la jaroj 1995 ĝis 2010 li estis prezidanto de IFEA kaj poste IFEA Honora Membro.

Honoro al lia memoro.

72-a IFK - alia kongreso



En ĉijara Aprilo, kiam ni organizantoj de la Transporta Kongreso decidis transdatigi ĝin de 2020 al 2021, ni kalkulis pri baldaŭa reveno al normaleco, se ne ĝis la aŭtuno, tiam certe ĝis la fino de la vintro. Dum ni observis la infekto-evoluon kaj la anoncojn el la farmacia industrio,

montriĝis ke ni ĉiuj estis tro optimismaj.

Nun - sciante pri konkretaj esploraj rezultoj, kontraktoj kun la vakcino-produktantoj kaj organizaj planoj pri distribuo kaj apliko inter la homoj klariĝas: ankaŭ en Majo 2021 la kondiĉoj por internacia kongreso estos eksterordinaraj kaj esceptaj.

Probable la pandemio plue decide influos la turismon. Aertrafikaj ofertoj restos maloftaj kaj nefidindaj. Hoteloj kaj restoracioj restos fermitaj respektive laboros kun limigita kapacito. Depende de sia sukceso la infektoprotektaj restriktaj estos neplaneble streĉataj aŭ malstreĉataj ene de diversebenaj administraciaj distriktoj. Libera limtransiro kaj libera renkontiĝo en grupoj ne estos garantiablaj.

Por tamen ebligi riĉan programon por laŭeble vasta publiko ni nun planas hibridan aranĝon, kiun karakterizu loka renkontiĝo inkludanta retan partoprenon. Ni kontraktas pri salonoj kaj la necesa loka infrastrukturo kaj helpe de propraj fakuloj kaj retaj servoj instalos

kanalojn por spekti la lokan programon, por kontribui rete al la programo kaj por partopreni en miksitaj lokaj/retaj diskutrondoj. La hibrida kongreso havos reduktitan daŭron de la 21-a ĝis la 24-a de Majo 2021. Turismajn ekskursojn eblos oferti nur en limigita nombro. La postkongreso ne okazos.

Kotizoj ankoraŭ ne estas fiksitaj. Antaŭpagojn ni reĝiros kompletajn kaze de nepartopreno, respektive partajn kaze de partopreno fizika aŭ reta. En la momento ni retiras la publikigitajn antaŭkongresajn informojn kaj petas atenti la retpaĝon de IFEF (www.ifef.net) kaj de la kongreso (www.esperanto.de/ifk).

Guido Brandenburg (nome de LKK 72-a IFK)

Anonco pri elektoj dum la jaro 2021 en IFEF

Mi informas legantojn de la „Internacia Fervojisto“ kiel membrojn de landaj asocioj kaj individuajn membrojn, ke en la jaro 2021 finiĝos mandatoj de sekvontaj funkci(ul)oj, elektitaj en la jaro 2018 dum 70-a kongreso de IFEF en *Wrocław* por mandatoj daŭrantaj tri organizajn jarojn: - gvidanto de Faka Komisiono; - ĉefkomitatano de IFEF; kaj – anstataŭanto de la ĉefkomitatano. Interesitoj pri anoncitaj funkcioj (taskoj) devas en skriba formo anonci siajn kandidatiĝojn ekde aperigo de anonco en IF ĝis la 10-a de Februaro 2021 al ĉefkomitatano kaj sekretario de IFEF (vidu la IFEF adresaron 2020).

La gvidanton de FK laŭ IFEF-Statuto elektas la membroj de la Faka Komisiono. La elekton poste devas konfirmi kaj aprobi Komitato dum sia Plenkunsido, kaj tiam gvidanto de FK fariĝos samtempe membro de la IFEF-estraro. La elekton de la ĉefkomitatano de IFEF kaj anstataŭanto de la ĉefkomitatano la Statuto priskribas tiel, ke ĝi okazas inter membroj de la Komitato dum Plenkunsido.

Koncernaj elektoj okazos dum sekvonta kongreso de IFEF en *Frankfurt am Oder/Stubice* aŭ per elektronika voĉdonado, depende de la cirkonstancoj kaŭzitaj de la koronavirusa pandemio, plej verŝajne en Majo 2021 ĝis kiam pasos tri jaroj de la koncernaj mandatoj komenciĝintaj ekde la Majo 2018. Pri ĉi-tiuj kaj aliaj koncernaj detaloj aperos informoj kaj anoncoj dum sekvontaj monatoj.

Ĉefkomitatano de IFEF, Zlatko HINŠT

Gvidanto de la Faka Komisiono

La jaro 2021 estas elektojaro por la Faka Komisiono – por la tri funkciuloj: la gvidanto kaj la du sekci-sekretarioj.

Mi estis gvidanto de FK ekde 2000, kaj estis tre interesaj jaroj kun multaj diversaj aktivecoj rilate la fakan laboron kadre de IFEF. Mi havis tre bonan kunlaboron kun Heinz Hoffmann kaj Ladislav Kovář kaj poste Guido Brandenburg kaj Jaroslav Matuška.

Sed post tiom da jaroj mi sentas, ke FK meritas kaj bezonas alian, freŝan gvidanton – kun novaj ideoj kaj novaj pensoj. Tial mi per tio ĉi informas, ke mi ne rekandidatiĝas por la posteno de gvidanto de Faka Komisiono.

Mi instigas al ĉiu el vi, kiu interesiĝas pri la faka laboro ene de IFEF pripensi, ĉu tiu tasko estas tasko por vi. Mi certigas al vi, ke la du sekretarioj helpos al vi kaj kunlaboros kun vi.

Se vi pri io dubas – pri la taskoj, pri la vasteco de la laboro ... ne hezitu kontakti min.

Kun amikaj salutoj

Jan U. Niemann

ALVOKO AL ĈIUTAGA KOMUNIKADO !

EN LA 21-A JARCENTO, ĈIUTAGE KOMUNIKU !

EN LA 21-A JARCENTO, ĈIUTAGE KOMUNIKU EN IFEF !

Inter kongresoj kaj renkontiĝoj, krom la retejo <www.ifef.net>,

ankaŭ retliston kaj Facebook-diskutejojn IFEF proponas al vi por ĉiutage komuniki kun aliaj membroj kaj interesiĝantoj pri fervojo kaj Esperanto.



Retlista forumo: mesaĝo de vi sendita atingos pli ol 80 samlistanojn (komence de Decembro 2020). Por aliĝi, simplas: sendu mesaĝon al <laurent@ifef.net>.

Facebook-paĝo:

[https://www.facebook.com/IFEF-Internacia-](https://www.facebook.com/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio-726039834155372)

[Fervojista-Esperanto-Federacio-726039834155372](https://www.facebook.com/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio-726039834155372)

(aŭ pli simple: <http://ifef.free.fr/IFEFpagho>)

Facebook-grupo:

<https://www.facebook.com/groups/1474049546197685>

(aŭ pli simple: <http://ifef.free.fr/IFEFGgrupo>)

Vizitu, legu, informiĝu, diskutu kaj ankaŭ vi diskonigu informojn pri viaj Esperanto-agadoj en fervojista medio ktp.

IFEF atendas vin! Ankaŭ invitu viajn konatojn esperantistojn fervojistojn aŭ/kaj fervoj-amikojn, ne nur por interŝanĝi ideojn kaj spertojn, sed ankaŭ por aliĝi al IFEF. Ju pli multnombraj estas la komunumoj, des pli fruktodonaj estas la interrilatoj.

Ĝis baldaŭ en interreto kaj en IFEF!

Laurent Vignaud

Nova fervoja prov-instalaĵo malfermiĝos en Anglio

Nova prov-esplor-instalaĵo fokusos je grandrapida fervojtrafiko kaj supera testo de trako-veturilo-sistemo.

La registaro de Britio konfirmis la kunlaboron financon por kreado de unu el la plej avangardaj provinstalaĵoj por ordinara kaj grandrapida trajnoj en la mondo – ĝi situos en *Leeds*, Britio.

La instituto *IGTSI* estos revolucio por la maniero inventi, evoluigi kaj enkonduki novajn fervojsistemojn.

La centro troviĝos ĉe la *Leeds*-a eksterurba entreprena zono, kaj ĝi estos la unua etapo de ambicia plano involvi la lokajn aŭtoritatojn kaj entreprenojn por antaŭenigi la pozicion de la urbregiono kiel angla centro por fervoja scienco - tio kreos laborlokojn kaj bazon por investoj.

La celo estas, ke la instituto en *Leeds* povos esplori fervojon kiel „integritan tutaĵon”: la interago inter trajnoj, trakoj, elektronikaj sistemoj kaj signaliloj.

La sciencaj esploroj kaj rezultoj transformos fervojsistemojn – ne nur en la lando, sed en la tuta mondo.

La registaro kontribuis per preskaŭ 13 milionoj da eŭroj al realigo de la projekto. Ĉirkaŭ 47 milionoj da eŭroj venis de la universitato kaj fervoj-industriaj partneroj, kaj pliaj 14,5 milionoj da eŭroj de la

Urbregiona Komerca Partnereco (*Local enterprise partnership*) de *Leeds*.

Jake Berry, ministro de *Northern Powerhouse* (1), diris: „Plibonigo de transporteblecoj por homoj en la norda regiono restas prioritato por ni, kaj estas nature, ke la esplor-instalaĵoj de la instituto *IGTSI*, kiam ĝi fine plene funkcios, povos renovigi la transportsistemon profite al la



Artista interpreto de la urbkvartalo planita por la Instituto por Grandrapidaj Trajnoj kaj Sistema Integriĝo - IGTSI (*Institute for High Speed Rail and System Integration*) en *Leeds* (fonto: Universitato de *Leeds*)

pasaĝeroj – por la 21-a jarcento kaj estonte. Universitatoj tra la regiono de *Northern Powerhouse* havas fortan tradicion esti je la pinto rilate al sciencaj esploroj kaj novaĵoj, kaj pro tio daŭra investo de la registaro en niajn altlernejojn kaj institutojn estas tre grava.”

La subvencio de la registaro por la instituto *IGTSI* venas de la Britiaj esplor-partneroj kaj invest-fondaĵoj – administrataj de la esplor-organizo *Research England* (2) por faciligi unuaklasajn esplorinstalaĵojn kaj -blojn. Por ĉiu eŭro investita de la registaro estas necesa la duoblo de aliaj fontoj, ekz-e komercaj organizoj kaj fondusoj.

Profesoro Lisa Roberts, anstataŭa vicestro de „Esploro kaj novigo” ĉe

la universitato de *Leeds*, diris: „La vera potenco de la instituto *IGTSI* estas, ke ĝi kreiĝis kunlabore kun la fervojindustrio por helpi solvi grandajn kaj gravajn esplortaskojn. Kunlaboro inter universitatoj kaj industrio havos gravan kaj tute esencan rolon estonte en la fervoja evoluo. Se vi rigardas la industriajn strategiojn de la registaro, neniam antaŭe estis same grave por la universitatoj kunlabori kun komerco kaj industrio, kaj la esplor-fondusaj strategioj kaj interkonsentoj vere estas kataliziloj por tiaj kunlaboroj.”

La celo estas, ke tiu instituto estu plene funkcia en la jaro 2021. *IGTSI* situos en la *Leeds*-a entreprena urbazono, proksime al aŭtoŝosea el- kaj alirejo.

Peter Hendy, estro de la brita infrastruktura kaj bontenada entrepreno *Network Rail*, diris: „Tiu nova prov-instalaĵo estos inter la plej progresintaj en la mondo, kaj ĝi revoluciigos la aliron al dezajno kaj enkonduko de grandrapida fervojo de nia lando. Ĝi reduktos la problemojn, kiujn ni alfrontas en la praktika fervojo, kaj ĝi helpos alporti ekonomian progreson kaj laborlokojn al la regiono dum multaj jaroj estonte. *Network Rail* volonte subtenas tiun kuraĝan iniciaton de la Universitato de *Leeds*.”

Avangarda teknologio

La koro de la prov-instituto estos la tri pioniraj instalaĵoj:

- Testo de veturiloj - la instalaĵo baziĝas je la principo de „ruliĝanta vojo” kaj ofertas varian trak-geometrion, kiun oni povas programi ... tiel ĝi povas reflekti kiun ajn fervojitinon en la mondo, kaj ĝi povas testi rapidecon ĝis 400 km/h. La prov-instalaĵo ebligas esplorojn de novaj trakcistemoj, bremsoj, novaj materialoj kaj metodoj por plibonigi energi-efikecon. Ĝi testos la veturilojn sub „realaj kondiĉoj”.
- Testo de infrastrukturo - alia test-instalaĵo simulos la fortojn je trako, balasto kaj subten-materialoj, kiel ekz. la tereno, por ordinara kaj grandrapidaj trajnoj ĝis proks. 400 km/h. Oni konstruos ĝin en libera aero kaj ne en laboratorio, kaj tio ebligos pli precizan simulon de la subtera dinamiko.
- Sistem-integra kaj novaĵa centro - tiu centro donos eblecon esplori trajnon, trakon, elektronikajn sistemojn kaj signalilojn kiel integritan unuon – la celo estas eltrovi, kiel ŝanĝoj en unu parto influas al kaj

interagas kun la aliaj partoj. Oni povos analizi datumojn de la testveturilo kaj -infrastrukturo. Ekz., la centro povos fari esplorojn de cifereca signalado, elektronikaj sistemoj kaj elektromagneta interfero.

Profesoro Peter Woodward, estro de la instituto, diris: „La laboro de la instituto estos revolucia en la kampo de testado, lanĉado kaj konstruado de novaj trajnoj, fervoja infrastrukturo kaj sistemoj en nia lando kaj eksterlande. La prov-instalaĵo metas la grandurbregionon de *Leeds* en pozicion kiel gvidanto rilate al evoluigo de grandrapidtrajna tekniko, kaj la centro grave kontribuos al la ebleco de Britio evoluigi, testi kaj aprobi novan fervojrilatan teknologion por la komerca eksportmerkato. La kapacito de la test-instalaĵoj havas tutmondan signifon, kaj mi tre ĝojas pro la subteno, kiun ni ricevis de ĉiuj entreprenoj kaj aŭtoritatoj, kiuj helpis nin prepari tion dum la pasintaj du jaroj. Estas bona tempo okupiĝi pri reltrafiko, kaj per tiu nova kapacito, kiun reprezentas la instituto *IGTSI*, la estonto de la fervojo en Britio estas tre hela – por industrio kaj pasaĝeroj.”

Mark Thurston, direktoro de grandrapidtrajna programo kaj projekto *High Speed 2 Ltd.*, diris: „La sindediĉo de la registaro prizorgi tiun lastan parton de la fundamento de tiu instituto *IGTSI* estas ankoraŭ signo de fido en la ekonomia profito, kreado de laborlokoj kaj kompetentecoj pri grandrapida reltrafiko, kiu influos ne nur al *Leeds*, ne nur al la regiono, sed al Britio entute. *High Speed 2* trafikos inter *London* kaj *Birmingham* en 2026, kaj en 2033 daŭrigos ĝis *Leeds*, kaj tiu instituto *IGTSI*, tiu mondklasa esplor-instituto, estos ege grava por la sukceso de grandrapida trajntrafiko en Britio.”

Bombardier Transportation faras la dezajnon kaj konstruas la trajnojn por Britio. Kunlabore kun *Hitachi Bombardier* ĝi evoluigis *Frecciarossa 1000* por la italaj ŝtataj fervojoj – la plej rapida kaj la plej mallaŭta grandrapida trajntipo de Eŭropo.

Robert Davies, grandrapidtrajna ofertdirektoro (*High Speed Train Bid Director*) ĉe *Bombardier Transportation*, diris: „La instituto *IGTSI* estos tre grava suplemento al la brita reltrafika kapacito, kaj ni jam diskutas kun la instituto, kiel ni povas uzi ĝin kaj ĝiajn kapablojn por trajnoj, kiujn ni dezajnas kaj konstruas en Britio.”

Refortigo por la grandurbregiono *Leeds*

La ekonomia evolu-plano de *Leeds* diras, ke la instituto *IGTSI* katalizos investojn en novaj transport-teknologiaj entreprenoj kaj la reltrafika industrio entute. *High Speed 2* diris jam indikis, ke la situo de la orienta proviz-deponejo estos tuj ĉe la instituto *IGTSI*.

La kontribuo de pli ol 14 milionoj da eŭroj al la instituto *IGTSI* de la *Leeds*-regiona industri-partnereco *Growth Deal* estas parto de kompleta sumo de 1,13 bilionoj da eŭroj de registara investo – en partnereco kun Okcidenta *Yorkshire* Kunlaborantaj Aŭtoritatoj por plirapidigi kaj plialtigi la evoluon kaj la kreadon de laborlokoj en la regiono.

Roger Marsh, prezidanto de la *Leeds*-a grandurb-regiona entrepren-partnereco (*Leeds City Region Enterprise Partnership*), diris: „La instituto *IGTSI* estas unua etapo de ekonomia evolu-programo, per kiu la *Leeds*-a grandurb-regiono iĝos nacia centro por ordinara same kiel grandrapida inĝeniera laboro.

La test-instalaĵo allogos multajn entreprenojn, kiuj laboras pri reltrafiko. Kune tiuj entreprenoj havos la kapablon krei milojn da laborlokoj kaj sekurigi por nia regiono la „pint-lokon”, ne nur de la hodiaŭa teknologio, sed ankaŭ por morgaŭ kaj por la estonteco.”

Judith Blake, estro de la urba konsilantaro en *Leeds*, diris: „La instituto *IGTSI* havos gravan rolon kiel monda gvidanto de altkvalita inĝeniera laboro, nova infrastrukturo, novigado kaj instruado. Situanta najbare al la *High Speed 2*-deponejo, ĝi estas plia grava aprobo de la *Leeds*-a grandurb-regiona komerc-zono kiel ekonomia motoro por la urbo kaj por la regiono. Ankaŭ ĝi bone kongruas kun la kresko-strategio de la urba konsilantaro: per investoj krei laborlokojn kaj oferti al junaj homoj eblecojn en *Leeds* kaj en la regiono lerni pionirajn fakojn por krei gvidan industrion por nia nacia transportreto.”

Kune kun la Reltrafika Esplor-Instituto (*Institute of Railway Research*) ĉe la universitato de *Huddersfield*, la Grandrapida Reltrafik-Universitato (*High Speed Rail College*) en *Doncaster*, la Rel-reta Universitato (*Network Rail Campus*) en *York* kaj la produktad-eblecoj en la *Leeds*-a grandurb-regiono – ĉiuj en Anglio – ekzistas unika ekonomia eblo por avangarda produktado, inĝenieraj laboro kaj

edukado en la regiono kaj en la norda parto de Anglio entute por kompletigi la celon de la *Northern Powerhouse*.

Klarigoj:

(1) *Northern Powerhouse*: granda kaj tre ambicia evoluprogramo por la nord-angla regiono kun la urboj *Manchester*, *Liverpool*, *Leeds*, *Sheffield*, *Hull* kaj *Newcastle*.

(2) *Research England*: Nacia esplor-organizo por la avangardaj kaj estontaj teknologioj.

Fonto:

http://www.leeds.ac.uk/info/130578/institute_for_high_speed_rail_and_system_integration

Jan kaj Lene Niemann

Fervojnovaĵoj el la mondo

Trajnoj kaj busoj senpagaj

Luksemburgio estas la unua lando en la mondo, kiu de la 1-a de Marto 2020 proponas al ĉiuj uzantoj publikan amastransporton senpage. Por la ŝtato kun proksimume 613 000 loĝantoj tio signifas elspezi ĉirkaŭ 41 milionojn da eŭroj jare por certigi trafikon de busoj, tramoj, metroo kaj trajnoj. Vojaĝantoj pagos vojaĝkotizon nur en tiu kazo, ke ili uzos 1-an klason en trajno.



Pasaĝertrajno en Luksemburgo.

Ĉi tiun nepre revolucionan decidon aprobis la luksemburgia kabineto post averto de trafikfakuloj, ke tiu malgranda ŝtato la pligrandiĝantan amplekson de individua transporto jam ne kapablos regi. Dum lastaj dudek jaroj kreskis la nombro da loĝantoj en la dua plej malgranda lando de Eŭropa Unio je preskaŭ unu triono. Krom tio pli ol 200 mil homoj el Francio, Belgio kaj Germanio ĉiutage vojaĝas por labori en Luksemburgion. Matenaj kaj vesperaj multhoraj ŝtopiĝoj okazas preskaŭ ĉiutage.

Laŭ *Frankfurter Rundschau*, Reportér AŽD 1/2020

Eŭropa Parlamento aprobis Eŭropan Jaron de Fervojo 2021

Deputitoj de Eŭropa Konsilio kaj de Eŭropa Parlamento atingis anticipan interkonsenton pri la jaro 2021 – Eŭropa Jaro de Fervojo. Dum la jaro okazos aranĝoj kaj iniciatoj por altigi kvocion de personoj kaj varoj moviĝantaj per fervojo. Tio estas unu el la celoj de Eŭropa „verda interkonsento”.

Laŭ Eŭropa Konsilio estos vojaĝado per fervojo medikonvena, komforta kaj sekura kaj havos ĉefrolon en strebado de EU esti al la jaro 2050 klimatneŭtrala. Jaro de Fervojo subtenos la trajnon kiel daŭripovan kaj novigan transportebilon, kiu povas certigi bazajn servojn ankaŭ dum neatenditaj krizoj. Pri tio atestas la strategia rolo, kiun fervojtransporto havas dum krizaj konektoj en tempo de *Covid-19* pandemio por pasaĝer- kaj baza vartransporto.

Signifo de fervojo.

„Fervojo estas respondo je pluaj gravaj demandoj de movkapableco, kiel ekz. klimatneŭtraleco, energia efikeco, rezistkapablo kontraŭ krizoj kaj sekureco” diras Andreas Scheuer, germana ministro por transporto kaj diĝita infrastrukturo. „Jaro de Fervojo donu subtenon al la fako, kaj pli da turistoj, entreprenistoj kaj produktistoj elektu trajnon.”



Bruselo: konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono

Aŭtoro: Trougnouf (Benoit Brummer), Wikimedia

studojn pri fareblo. Unu pri ekfunkciigo de eŭropa marko por subteno de fervoja vartransporto kaj la dua pri indekso de fervoja konektebleco, simila al ekzistanta indekso de flugtransporto. Oni alvokas la Komisionon informi Konsilion kaj Parlamenton ĝis fino de Marto 2021 pri siaj planoj.

Anticipan kontrakton devas aprobi ankoraŭ la Konsilio. Estraro intencis

Inter pliaj celoj por ĉi tiu jaro troveblas pligrandigo de la konscio pri translima eŭropa fervojtransporta dimensio kaj pligrandigo de ĝia efikeco por ekonomio, industrio kaj socio en EU.

Studo pri fareblo.

De Eŭropa Komisiono estos postulate pritaksi du

prezenti la kontrakton al Komitato de daŭraj delegitoj de la Konsilio en Novembro por aprobo.

Verda propono.

Kvaronon da emisioj de forcejgasoj en la Unio kaŭzas transporto kaj tiu kvociento plue kreskas. Por neŭtraligi tiujn emisiojn ĝis la jaro 2050, estas necese malgrandigi la emisiojn je 90 procentoj. Multe malpli da CO₂ ekestas dum trajnveturo ol dum simila vetura sur ŝoseo aŭ en flugtransporto. Temas pri unu el malmultaj transportspecoj konstante reduktanta forcejgasojn ek de la jaro 1990.

Nuntempe okazas 75 procentoj de enlanda vartransporto sur ŝoseo. Venonta jaro estas la unua kompleta jaro en kiu estos akceptigitaj reguloj de la kvara fervojpaketo en la tuta EU. Ĉi tiuj reguloj malfermus enlandan merkaton de pasaĝertransporto kaj malgrandigus elspezojn kaj administrajn ŝarĝojn de fervojkompanioj aktivaj en la tuta EU.

Laŭ artikolo de Esther Geerts, *RailTech.com*, 18.11.2020

Usona Fervojasocio: Joe Biden reprenos grandrapidan fervojon en diskutvicon

Usona asocio por grandrapidaj fervojoj (*USHSR*) preparis strategian planon por grandrapida fervojreto en Usono kun listo de projektoj por la Biden-administracio. *USHSR* kredas, ke la plano fariĝos „sparko de la dua granda fervojrevolucio” en Usono. Ĝis nun ne ekzistas en la lando reala grandrapida fervojreto.

De la jaro 2009 la *USA High Speed Rail Association* klopodas pri uzadpligrandigo de nacia, la plej moderna grandrapida trausona fervojo per prezentado de ĝiaj avantaĝoj. „Ni estas entuziasmigataj, ke ni povas prezenti la novan planon, ĉar venas nova administracio celanta al fervojo,” diras Andy Kunz, prezidanto de *USHSR*. „Ni estas preparitaj kunlabori jardekojn kun Joe Biden, kiu montriĝis esti grava fervojentuziasmulo, kaj kun Kongreso, gubernatoroj kaj usona popolo, por realigi multajn novajn sistemojn tra la tuta lando ke ĉiu povu uzadi ilin.”

Projektoj - Tiel nomata 5-punkta *HG Rail Plan* proponas kune kun *USA* Transportministerio (*USDOT*) fondi oficejon por disvolvigo de grandrapida fervojo, kiu gvidu kaj direktigu la programon kunlabore kun unuopaj ŝtatoj.

La nova oficejo elektu la kvin plej grandajn projektojn de grandrapidaj fervojlinioj en la lando. Proponitaj projektoj estas Kalifornio, Teksaso, *NEC*-plivastigo (*NY City* tuneloj), *Cascadia* (*Pacifik NW*) kaj Florido (*Tampa – Orlando*). Pliaj dek grandrapidaj fervojprojektoj estas je la dua loko en prioritato por financado kaj la oficejo helpu en preparlaboroj kaj planado, traceostudoj, permesoj, grundakiro kaj antaŭkonstrulaboroj.



Grandrapida trajno Acela
Foto: Railnews.cz

Nuntempe estas linio *Acela* laŭlonge de koridoro *North-East* trafikata de kompanio *Amtrak* ununura grandrapida fervojlinio en Usono. Tie oni povas veturi ĝis 150 mejlojn hore (240 km/h) sed nur je 33 mejloj el 100 mejloj de la tuta linio. Koncerne al averaĝa vojaĝrapido de 65 mejloj po hore (104 km/h) oni ne

povas tiun linion klasifiki kiel grandrapidan fervojlinion. Kelkaj projektoj de grandrapidaj trajnoj estas en konstruo, sed alfrontas obstaklojn. En Florido oni intencis komenci konstruadon de la unua etapo de grandrapida fervojo en la jaro 2011 kaj finkonstrui ĝin en la jaro 2014. Bedaŭrinde gubernatoro de Florido haltigis financadon de la projekto en la jaro 2011 pro tro granda kresko de elspezoj.

Kunlaboro

La kvinpunkta projekto *HG Rail Plan* kunlaboros kun aviadilkompanioj kaj flughavenoj por anstataŭigi flugojn je mallongaj distancoj per grandrapida fervojo kaj per alkonduko de fervojo al ĉefaj flughavenoj. Laŭ *USHSR* povas fervojindustrio kunlabori kun aviadilkompanioj je estigo de kombinitaj vojaĝbiletoj por komunaj vojaĝoj helpe de fervojo kaj flugtransporto. La usona loka merkato de turisma movado transformiĝos tiamaniere, ke ĝi faciligos, rapidigos kaj verdigos vojaĝadon kaj samtempe donos al flugkompanioj kaj flughavenoj avantaĝojn per koncentriĝo al longdistancaj flugoj. „Ni devas kunlabori transverse de partiaj klopodoj por fortigi infrastrukturon de la nacio,” diras eksa trafikministro Anthony Foxx.

Laŭ artikolo de Sarah Chebaro, *RailTech.com*, 19.11.2020

Agado en Landaj Asocioj

Ankaŭ ĉe FFEA okazis unua fojo!

2020 certe estis nekutima jaro, dum kiu tra la tuta mondo okazis multegaj unuaj fojoj! Ankaŭ ĉe FFEA, Franca Fervojista Esperanto-Asocio, tio okazis: la unuan fojon en sia historio la asocio rete kunvenis.

Ja pro tutlanda trudizoliĝo, multaj aktivaĵoj ne povis okazi: staĝoj, kunvenoj, disdonadoj de flugfolioj ktp. Tio instigis la asocion pli rapide eniri en la 21-an jarcenton, en la epokon de retkomunikado, sed konstato estas, ke Interreto ne ĉion povas anstataŭi. Tial la bilanco estas simpla: plejmultaj el la planitaj okazaĵoj ne povis okazi.

Ĉar kontaktoj inter homoj estis draste limigitaj, ni ne povis amasdisdoni flugfoliojn al kolegoj. Ĉar kunvenoj en malgrandaj ĉambroj aŭ kun multaj homoj estis malkonsilitaj kaj eĉ plejofte malpermesitaj, okazis nek staĝoj, nek la tradicia Zamenhof-festo.

Por kompensi ĉion tion, la komitatoj, anstataŭ ĉiumonate renkontiĝi en Parizo, kunvenis per Interreto. Ankaŭ la Ĝenerala Kunveno tiel okazis. Pozitiva rezulto estis, ke la kunvenoj pli ofte okazis, ankaŭ kun partopreno de kelkaj kiuj ne kutimas partopreni pro malproksima loĝloko, sed la partoprenintoj ne povis ĝui la kutimajn amikecajn "kuntrinkajn post-kunvenojn", kiuj ankaŭ gravas post laborkunvenoj, same kiel gravas ekskursoj inter laborplenaj kunsidoj dum IFEF-kongreso.

Alia pozitivaĵo estas, ke la kriza situacio pli forte instigis FFEA-n proponi retkurson al interesigantoj. Jam antaŭ multaj jaroj naskiĝis la ideo, tamen sen konkretiĝo. Dank' al iniciato kaj gvidpreteco de Bruno Henry, retkurso okazos ekde la 27-a de Februaro (ĉiuj informoj tie, en la franca: <http://ifef.free.fr/visio>)

Laurent Vignaud, FFEA

Osez l'**ESPÉRANTO**
Langue rationnelle et équitable

À PARTIR DU 27 FÉVRIER 2021

Cours d'initiation en visioconférence

un samedi sur deux
de 9 h à 11 h

Les tarifs

- Adhérent AFCE : 15 €
- Non adhérent :
 - cheministe/ayant droit : 27 €
 - non cheministe : 32 €

Pour s'inscrire
avant le 1er février 2021
AFCE, chez Laurent Vignaud
3 allée du Haras, app. 122
49200 Angers
Tél. 02 41 20 19 40
Courriel : esperanto@ifef.net

Association française des cheministes pour l'espéranto
<http://ifef.free.fr/afce> LAICE

Interreta psikologia konsilado dum la pandemio de *Covid-19*.



Bedaŭrinde la pandemio ne finiĝis, kontraŭe novaj ondoj de malsano estas anoncigitaj.

Unuflanke la longdaŭro de la pandemio, timo de malsaniĝo kaj enhospitaliĝo aŭ de izolado kaze de infektiĝo, kaj aliflanke la troa streĉiĝo kaj laceco de ĉiuj, kiuj troviĝas en la unua linio en la batalo kontraŭ la nova koronaviruso evidentiĝis la neceson interveni ne nur per medicina helpo, sed ankaŭ per psikologiaj konsiloj, kiuj celas mildigi la psikan kaj emocian ŝarĝon de la koncernaj personoj.

Tiucele multaj enretaj kaj telefonaj psikologiaj konsilaj servoj aperis en Rumanio - kaj loke kaj nacie. Ili estis iniciatitaj de profesiaj asocioj kaj neregistaraj organizoj, medicinaj kompanioj aŭ universitatoj, montrante fortan solidarecon kun tiuj, kiuj dum la nunaj malfacilaj tempoj bezonas tiaspecan helpon.

Ĉi tiuj servoj celas plurajn kategoriojn: krom pacientojn en hospitalo kaj medicinan personaron ankaŭ tiujn, kiuj perdis la laborlokon, la gepatrojn kiuj devas labori hejme zorgante samtempe la infanojn, la lernantojn kiuj restis izolitaj en siaj domoj en tempo kiam la kontaktoj kun samaĝuloj estas tre gravaj, la familianojn kiuj perdis karan personon pro koronaviruso, ktp.

La simptomoj estas diversaj, sed ĝenerale regas angoro, streĉo, deprimiĝo, senpoveco, elĉerpiĝo.

Tiuj, kiuj telefonas havas aliron al atestitaj psikologoj specialigitaj pri subtena konsilado kaj mastrumado de streĉaj situacioj en la ĉiutaga vivo. Ili laboras kiel volontuloj kaj estis trejnitaj por trakti la problemojn ekaperintajn dum ĉi tiu specifa periodo. Alvokantoj estas certigataj pri la konfidenceco de siaj konversacioj kaj identeco, kaj la personaj datumoj ne estas prilaborataj aŭ stokataj iel ajn.

Mi persone aliĝis al teamo de psikoterapiistoj en mia urbo Braŝovo kaj ekde Marto subtenis per psikologiaj konsiloj pli ol 200 personojn. La ritmo estas de du ĝis kvar horojn tage, tri tagojn semajne. Proponi nian helpon en tiuj malfacilaj tempoj por ĉiuj kiuj bezonas ĝin estas ne nur necese, sed memkompreneble. Mi ege kontentas ke la projekto pruvas sian utilecon kaj la sociaj kaj personaj eĥoj estas pozitivaj.

Psik. Rodica Todor

IFEF-membro helpas dum koronavirusa pandemio



Ĉiuj landoj en la mondo batalas kontraŭ la koronavirusa pandemio. Merithava estas ĉiu helpo al sanprotektaj organizaĵoj, kiun proponas volontuloj. En sudmoravia urbo *Hodonín* (Ĉeĥio) tiun helpon organizas magistrato, kiu jam dum printempa epidemia ondo decidis helpi al aĝuloj en la urbo kun liverado de nutraĵoj kaj medikamentoj. La servo funkcias sekve - aĝulo telefone prezentas sian deziron al oficisto en magistrato. La oficisto elektas volontulon kaj alvokas lin por transpreni liston de aĉetaĵoj kaj antaŭpagon kune kun nomo kaj adreso de la aĝulo. La


volontulo prizorgas necesan aĉeton kaj transportas ĝin (per sia propra veturilo) al la mendinto. Tuj surloke aĝulo pagas ĝustan monsumon kun kiu la volontulo revenas al magistrata oficisto por finkalkuli la aĉetaĵ-koston. Ĉiu volontulo-helpanto devas havi oficialan legitimilon eldonitan en urba oficejo.

En la urbo *Hodonín* estas multe da volontuloj, kiuj tiamaniere helpas al aĝaj aŭ move limigitaj loĝantoj. Por sia laboro ili ricevas neniun salajron. Tamen la urbo aprezis ilian aktivadon per solena koncerto kun danko de urbestro kaj diplomo kun malgranda memoraĵo. Inter la volontuloj estas ankaŭ esperantistino-fervojistino Mgr. Andrea Švubová.

Ladislav Kovář

Amuza anguleto

Kaŝita proverbo:



Skribu en malplenajn ĉelojn de unua ĝis la lasta linio unuajn literojn de serĉataj vortoj.

Helpo:


Ĉiuj serĉataj vortoj estas kvinliteraj. Du el ili estas „afiŝo” kaj „iriso”.

Serĉataj vortoj:

senluma parto de tago; sudeŭropano; mondflanko; malinfero; sankta bildo; mielona insekto; konsumi nutraĵon; labori per rastilo; persono amata; parto de frazo; papera anonco; nordeŭropano; malrekta; parto de okulo; kantata dramo; nulo; malblanka; sankta birdo de antikva Egipto; homoj kun komuna lingvo; plata; glacio falanta el ĉielo; citrono estas; blovanta aero; prepozicio „male post”; ĉimpanzo.

Preparis: Ivan Potiška

Solve el pasinta numero de IF: MELODRAMO,OPERO



Honorigitaj membroj de IFEF

Honora Prezidanto de IFEF

D-ro Bolognesi, Romano	Italio	2009
------------------------	--------	------

Honoraj Membroj de IFEF

De Sutter, Lucien	Belgio	1997
Nobuki, Naosuke	Japanio	2006
Robiolle, Pierre	Francio	2007
Stuppniĝ, Martin	Aŭstrio	2008
Inĝ. Gulyás, István	Hungario	2009
Brletić, Marica	Kroatio	2010
Ripoche, Jean	Francio	2010
Tomíšek, Jindřich	Ĉeĥio	2016
Litov, Georgi	Bulgario	2016
Inĝ. Kovář, Ladislav	Ĉeĥio	2018

Honoraj Membroj de FISAIC

De Sutter, Lucien	Belgio	1998
PhDr. Abelovská, Anna	Ĉeĥio	2007

Honorigitoj per speciala FISAIC-medalo

Geroldinger, Johann	Aŭstrio	1967
Robiolle, Pierre	Francio	1994
Huber, Walter	Aŭstrio	2010
Tomíšek, Jindřich	Ĉeĥio	2012

Honora Patrona Komitato de IFEF

Ceci, Pasquale	Italio	1970
Inĝ. Rodak, Aleksander	Pollando	1987
Zelenka, Vojtěch	Ĉeĥio	2003
PhDr. Abelovská, Anna	Ĉeĥio	2011